


AMERIKA ESPERANTISTO

AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE



GRAMATIKA
KARAKTERO
DE LA
ESPERANTAJ
RADIKOJ

TEORIO
KAJ
PRAKTIKO

K. KALOCSAY

OCT-DEC
1965



AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE
ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, Inc.
1837 N. E. 49th Ave., Portland 13, Oregon

Vol. 77

OCTOBER-DECEMBER 1965

Nos. 10-12

Central Office: Doris T. Connor, George Alan Connor (*see address above*)
Esperanto Book Service, Williamsburg P. O. Box 315, Brooklyn 11, N. Y.
Sustaining Board: Ralph H. Beard, Anonymous, C. C. Cummingsmith, S.M.,
GySgt. James C. Faughnan, Dr. Lee Min Han, W. F. Haygood, Jr., Austin
Herschel, J. Archie Johnson, Jr., Edward Lindberg, Chas. A. Lyon, Bertha
F. Sloan, Harold S. Sloan, Dr. Thomas B. Turner, Virgil Whanger.

A NOTE ABOUT THIS SPECIAL ISSUE OF A. E.

We send this special issue, "*La Gramatika Karaktero de la Esperantaj Radikoj*" to all members at this time for two reasons.

(1) Among our famed "Literatura Mondo" books it is an important treatise which has been out-of-print for some time now. Persistent demands for a reprint come to us from our more advanced members, and indeed from all parts of the world. Its author is the well-known authority on grammar in Esperanto, Dr. K. Kalocsay, who is co-author with G. Waringhien of the exhaustive 3-volume work, "*Plena Gramatiko de Esperanto*." There is no more appropriate time to publish this reprint than now, since December 15th has long been set apart as "*The Day of the Book*," i.e. for the printing and buying of Esperanto books in honor of Dr. L. L. Zamenhof's birthday on that date.

(2) Apart from the fact that we have long wanted to bring out a reprint of this important treatise, another impelling reason for doing so *now* is that serious illness in our family has, for some few months past, taken us away from our desks and work. These personal duties should end before the new year. Much excellent material has accumulated for the magazine, and plans for important analyses and surveys of the Esperanto Movement, both at home and abroad, are in the making. You will want to receive these articles throughout the coming year.

We trust you will understand the lateness of this issue, approve the worth of its contents, and heartily cooperate with us in plans for future regular publication for A.E. If you have not already done so, we ask that you send in your *RENEWALS* as soon as possible now, and await with us the important developments in the new year. As the old year draws to a close, we wish each and every member cordial greetings for the holidays: *GOJAN KRISTNASKON KAJ FELICAN NOVAN JARON.*

*Bildo sur kovrilo: Lignogravuro honore al la kreinto de nia lingvo,
D-ro L. L. Zamenhof, pro lia naskiĝtago, la 15-an de Decembro.*

Subscription \$5, Single copy 50¢, Library sub. \$2.50.
Jarabono eksterlande por kalendaro jaro: \$2.50 aŭ egalvaloro.
Gratis to Members of the EANA.

Regular Membership in EANA – \$5.00 per year. Patron – \$10.00.
Elementary or H.S. Students under 18 years – \$4.00 per year.
Sustaining Board – \$3.00 or more per month.

LA GRAMATIKA KARAKTERO DE LA ESPERANTAJ RADIKOJ

(*Teorio kaj Praktiko*)

K. KALOCSAY

La Prezidanto de la Esperanta Akademio entreprenis la redakton de la Oficiala Vortaro de Esperanto. Li intencis en tiu vortaro marki ankaŭ la gramatikan karakteron de la radikoj, signante, ĉu ili estas substantivaj (s), adjektivaj (a), aŭ verbaj (v).

Kontraŭ tiu utila kaj necesa laboro leviĝis principaj kontraŭdiroj, kiuj rifuzas kaj volas refuti, ke en Esperanto la radikoj havas ian karakteron jam en si mem. Laŭ ili la radikoj estas senkarakteraj stumpoj, al kiuj la sencon kaj la karakteron donas sole la finaĵo.

Per tio renoviĝas pri ĉi tiu demando la malnovaj, antaŭmilitaj diskutoj, kiujn estigis en la Akademio en 1911 la propono de *de Saussure*. Li prezentis tiam al la Akademio sian sistemon, baziĝantan sur la fiksitaj radik-karakteroj. La Akademio aranĝis enketon pri la temo. Malgraŭ ke la plimulto trovis la sistemon tre racia, konsekvenca kaj simetria, la Akademio ĝin ne akceptis; ĝi akceptis nur la principon de Neceso kaj Sufiĉo. (Ni vidas, ke tio estis tute mallogika, ĉar sen la kompleta sistemo tiu principo havas nenian sencon).

De tiam multaj okupiĝis pri la naturo de Esperantaj radikoj. *Kolowrat* ellaboris sistemon sur la bazo de la radika senkaraktereco. Tiu sistemo estas tre konsekvenca kaj ĝusta en si mem, sed ne konformas al la Esperanta lingvouzo, necesigas formojn, kiuj ne ekzistas en la uzata lingvo. *Kolowrat* senembarasigis sin tiel, ke li *permesis* la uzatajn formojn, neregulajn laŭ lia sistemo. Nu, sistemo, laŭ kiu la tuta lingvo konsistas el permesataj pekoj, certe ne povas esti la valida sistemo de tiu lingvo.

Höveler-Cefeč akceptis duopan radikdividon: laŭ li ekzistas radikoj konkretaj kaj abstraktaj. Sed tiun siste-

mon li ne ellaboris: li restis ĉe la teoria principo. Kaj — se oni komplete ellaborus lian sistemon, oni venus al la derivsistemo de Ido, kiu baziĝas sur la sama duopa divido de la radikoj.

La sistemo de de Saussure distingas tri ĉefajn radik-karakterojn: substantivan, adjektivan kaj verban. Ĉiuj, kiuj post la milito detale okupiĝis pri la Esperanta vort-farado, esplorante ĝin en ĉiuj eroj, (Wüster, Minor, mi mem), plene akceptis la de-Saussure-an sistemon, trovis ĝin plene konforma al la lingvouzo, eĉ la sola ebla sistemo aplikebla al nia lingvo. Kaj ĝin akceptis pli-malpli konscie ankaŭ la verkistoj: en la nuna lingvo bone sentiĝas la pliklariga, plifleksebliga influo de la sistemo, kiu, kiel ĉiu bona teorio, havas ne nur idean, sed ankaŭ praktikan, evoluigan signifon.

Kaj se oni ekzamenas la kontraŭopiniojn, oni vidas, ke ili aŭ temas pri detaloj sensignifaj (ofte diras per aliaj vortoj la samon), aŭ baziĝas sur miskompreno aŭ simpla nekompreneo de la afero.

Vere, estas strange, ke sistemo, kiun neniu refutis, des malpli povis anstataŭigi ĝis nun, kaj kiu ne nur konformiĝas al la lingvouzo en ĉiuj siaj detaloj, sed eĉ direktas kaj influas ĝin, ĝis nun ne estas oficiale rekonita.

Ties kaŭzo estas verŝajne, ke oni ne konas tiun sistemon, kaj tial oni kredas ĝin komplikita, ne povas antaŭdiri la sekvojn de la akcepto, timas pri ŝanĝoj de lingvouzo sekve de ĝi ktp. Tial mi nun volus montri, ke nenio el tio estas vera. Nenia detalo en bona Esperanto kontraŭdiras tiun sistemon, kiu estas simple la akravida konstato de la lingvaj faktoj ĉiuvorte observeblaj.

Nun ni vidu la sistemon mem.

La sistemo

La radikoj en Esperanto havas jam en si mem fiksitajn gramatikan karakteron: ekzistas radikoj substantivaj, adjektivaj kaj verbaj; nur malgranda parto estas senkarakteraj (konjunkcioj, prepozicioj ktp.).

RIM. La adverbajn radikojn oni povas klasi al la adjektivaj, do ne estas nepre necese distingi apartan klason adverban.

El la radikoj, per la finaĵoj, oni formas vortojn. Ankaŭ tiuj vortoj povas esti substantivaj, adjektivaj, verbaj, adverbaj. Sed, dum la radika karaktero estas esenca apartenaĵo de la radiko, neniam ŝanĝebla, la vorta karaktero dependas de ekstera elemento, de la algluita finaĵo, kiun oni povas ŝanĝi apud la sama radiko. Ekz-e, *kur* estas radiko verba, kaj restas ĉiam tia, male *kuri* estas vorto verba, *kuro* estas vorto substantiva, *kura* estas vorto adjektiva.

Adjektiveco aŭ verbeco de radiko do tute ne signifas, ke tiu radiko povas naski nur vorton adjektivan aŭ verban! Ĉar la vortkarakteron donas nur la finaĵo laŭplaĉe ŝanĝebla, ĉia radiko povas naski ĉiakarakteran vorton, se ĉi tiu havas sencon.

Per tio estiĝas du ĉefaj specoj de vortoj:

1) en la unua grupo la radiko kaj la vorto havas la saman gramatikan karakteron. Tiaj estas ekz-e martelo (substantiva radiko kun substantiva finaĵo), *bela* (adjektiva radiko kun adjektiva finaĵo), *kuri* (verba radiko kun verba finaĵo). Tiujn vortojn oni povas nomi samelementaj, ĉar la karaktero de ĝiaj elementoj (radiko kaj finaĵo) estas la sama. La finaĵo do havas nenian vortfaran signifon, ĝi estas *pleonasma*.

2) en la dua grupo la karaktero de la radiko kaj de la finaĵo estas malsama. Tiaj estas ekz-e *marteli* (substantiva radiko kun verba finaĵo), *belo* (adjektiva radiko kun substantiva finaĵo), *kura* (verba radiko kun adjektiva finaĵo). Tiujn vortojn oni povas nomi *malsamelementaj*, ĉar la karaktero de ĝiaj elementoj (radiko kaj finaĵo) estas malsama. La finaĵo ĉe ili ne estas pleonasma: ĝi donas al la vorto tian karakteron, kian la radiko ne havas.

La malsameco de tiuj du grupoj estas ne nur teoria: ĝi e videntiĝas tuj, kiam oni volas ilin pluformi per finaĵa ŝanĝo, sed tiel, ke en la nova vorto restu entenata la tuta senco de la vorto antaŭa. Ni vidu ekzemplojn:

a) *martelo* estas substantiva samelementa vorto. Ni faru el ĝi vorton verban: *marteli*. Sufiĉis simple ŝanĝi la finaĵon. La nova vorto entenas la substantivan elemen-

ton *martel* kaj aldonas per la verba finaĵo la sencon de ago. La senco de la nova vorto estas: *agi per martelo*.

aa) *marteli* estas malsamelementa (substantiv-radika, verbfinaja) vorto. Ni faru el ĝi substantivon, kiu signas la nomon de la ago *marteli*. Jen ni ne povas simple ŝanĝi la finaĵon je -o, ĉar per tio ni ricevus la nomon de ilo. Oni devas iel konservi la agan sencon, ĉar la radiko ĝin ne enhavas. Do oni devus diri *marteli-o*. Sed anstataŭe oni diras *martelado*: do *ad* estas la ekvivalento (parelemento) de -i, kaj anstataŭas ĉi tiun antaŭ alia finaĵo.

RIM. Se ni volas analogie formi el *bati* substantivon, kiu signas agon, ni ne bezonas meti *ad*. Ni simple ŝanĝas la finaĵon, kaj *bato* jam en si mem signifas agon, ĉar la agan sencon, do la verbecon enhavas la radiko mem!

b) *homo* estas samelementa vorto (substantivradika, substantivfinaĵa). Ni faru el ĝi adjektivon kun kvalita senco. Sufiĉas simple ŝanĝi la finaĵon: *homa*.

bb) *homa* estas malsamelementa vorto (substantivradika, adjektivfinaĵa). Ni faru el ĝi substantivon, kiu esprimas la nomon de la kvalito »homa«. Jen, ni ne povas simple ŝanĝi la finaĵon, ĉar per tio ni ricevus la nomon de persono (homo). Oni devas iel konservi la sencon de la finaĵo: *homa-o*. Anstataŭe oni diras *homeco*: do *ec* estas la ekvivalento (parelemento) de -a kaj anstataŭas ĉi tiun antaŭ alia finaĵo.

RIM. Se ni volas analogie formi el *bela* substantivon, kiu montras la nomon de la kvalito »ebla«, oni povas diri *belo*, ĉar la kvalitan sencon, do la adjektivecon jam enhavas la radiko mem.

Do: samelementaj vortoj estas pluformeblaj per simpla ŝanĝo de finaĵo. Malsamelementaj vortoj estas pluformeblaj nur tiel, ke la elfalantan finaĵon oni anstataŭas per ties parelemento (la finaĵon -i per *ad*, la finaĵon -a per *ec*).

Jen la sistemo. Kaj ĝia klarigo enhavas ankaŭ la pravigon de la radikkarakteroj: ĉe finaĵa pluformado oni devas nepre scii, ĉu temas pri vorto samelementa (tiam oni simple ŝanĝas la finaĵon), aŭ malsamelementa (tiam

oni aplikas parelementon); sed kion signifas sam- aŭ malsamelementeco? Identecon aŭ neidentecon inter la karakteroj de la radiko kaj de la finaĵo. Sekve — la radikoj devas havi propran karakteron.

La elasteco de la sistemo

Ci tiu sistemo estas senlime elasta. Tion oni plej bone povas montri esplorante la sencon kaj funkcion de la finaĵoj.

1) La o-finaĵo signas tion, kion la lingvo-filozofio nomas *ento*. Pli simple oni povas diri, ke ĝi montras la *nomon* de io (konkretaĵo, abstraktaĵo, kvalito, ago).

a) Ĉe la substantivaj radikoj, kiuj jam mem enhavas tiun nomon signifon, ĝi estas pleonasma. *Dom* estas la nomo de konkretaĵo, do la sama kiel *domo*.

b) La adjektivaj radikoj havas la signifon de karakterizo, do ili ĉiam apartenas al ia koncepto, ĝin determinante. La o-finaĵo kvazaŭ liberigas ilin el tiu dependeco kaj nomas ilin absolute, sendepende de karakterizata objekto. Tiu absoluta senco povas esti trispeca: 1) abstrakta koncepto: *la belo*, *la bono*, *la utilo*; 2) ies kvalito en si mem: *la belo* (de virino), *la bono* (de konsilo), *la utilo* (de ago); ĉi-sence la lingvo plej ofte uzas *e c o*: (*beleco*, *boneco*, *utileco*); 3) la konkreta manifestiĝo de io: *beloj* (de virino), *malglatoj* (de vojo), *malfaciloj* (de tasko); ĉi-sence la lingvo plej ofte uzas *a ĵ o* (*belajoj*, *malglataĵoj*, *malfacilaĵoj*); 4) la konkreta manifestiĝo povus esti eĉ individua, do ĝi povus montri ankaŭ personon (*belo* = *belulo*); sed ĉi tiun eblon la lingvo uzas ekstreme malofte.

RIM. Kiel oni povas vidi, la sistemo permesas unuflanke tian ekstreman elastecon, kian la lingvo eĉ ne uzas (estas do plene nemotivite paroli pri »idista rigideco« sekve de ĝi); aliflanke ĝi ebligas plej precize distingi inter konkreta manifestiĝo, kvalito kaj abstrakto.

c) Ĉe la verbaj radikoj la o-finaĵo signas unuavice

la nomon de ago: *bato* (la ago bati). Sed ĝi povas signi ankaŭ ion abstraktan: ne aktualan agon, sed kvazaŭ idean koncepton: amo, danco, kulturo; la nomon de aktuala ago oni signas tiaokaze per a d o : *amado, dancado, kulturado*. Aliparte, per sia konkretiga senco, ĝi povas signi ankaŭ la konkretan manifestiĝon, la rezulton de la ago (konstruo, skribo, havo), kvankam ĉi-sence oni uzas plej ofte a ĵ o (konstruaĵo, skribaĵo, havaĵo).

Oni do povas diri, ke la o-finaĵo povas a) signi simple la nomon; b) konkretigi, c) abstraktigi. Ĉi tiuj tri sencoj alternaj permesas en la lingvo uzi mallongajn, resumajn formojn, sin bazante sur la kunteksto.

2) La a-finaĵo signas la adjektivecon, t. e. la karakterizan funkcion: tion, ke la respektiva koncepto ne estas memstara, sed servas por ies determino.

a) ĉe la substantivaj kaj verbaj radikoj la a-finaĵo povas havi tri specojn de determino: 1) identecon: *reĝa persono* (persono, kiu estas reĝo), *ama sento* (sento, kiu estas amo); 2) kvaliton: *reĝa sinteno* (sinteno reĝkvalita), *ama koro* (koro amkvalita); 3) rilaton aŭ apartenon: *reĝa ĝardeno* (ĝardeno apartena al reĝo), *ana letero* (letero rilata al amo). Tio estas plene logika, ĉar la a-finaĵo signas sole la dependecon, la determinan funkcion, do ĝi povas montri ĉiujn eblajn specojn de tiu determino (identecon, kvaliton, rilaton).

b) ĉe la adjektivaj radikoj la a-finaĵo estas pleonasma, do nenion aldonas al la radiko, ties kvalita senco manifestiĝas neinfluite. El tio sekvas, ke ĝi ne povas al ĝi doni alian sencon krom la kvalita, do nek identeco, nek rilato estas per ĝi esprimebla. Efektive: *belo kvalito* neniam signifas *kvalito kiu estas belo* (identeco), nek *belo letero* signifas *letero pri belo* (rilato), sed *belo* ĉiam montras nur unu el la ecoj de tiu kvalito aŭ letero. Tio estas akra diferenco inter adjektivaj kaj verbaj aŭ substantivaj radikoj.

3) La verbaj finaĵoj estas pleonasmaj ĉe la verbaj radikoj, do ĉe la pluformado ili povas elfali sen anstaŭigo.

a) ĉe la substantivaj radikoj la i-finaĵo signas: *agi*

per (marteli: *agi per martelo*), aŭ *agi kiel*... (reĝi: *agi kiel reĝo*).

c) ĉe la adjektivaj radikoj ĝi signas *esti -a* (utili, rapidi, blanki, nigri, sufiĉi, necesi: *esti utila, rapida, nigra, blanka, sufiĉa, necesa*). Tamen, tiuj formoj, kontraste kun la formoj *estas -a*, enhavas ian nuancon de ago (utili: *agi utile*; blanki: *impresi blanke*).

Post tio ĉi oni devas konstati, ke ĉiuj uzataj vortformoj, de la plej precizaj ĝis la plej resumaj, kaj pleje sin apogantaj sur la helpo de la kunteksto, estas plene konformaj al ĉi tiu sistemo.

Aliflanke, se ni esploras la *limojn* de tiu elasteco, ni vidas, ke ili perfekte kongruas laŭ la sistemo kaj laŭ la lingvouzo.

La *substantivaj* radikoj, kiel ni vidis, signas la nomon de konkretaĵo. La o-finaĵo ĉe ili estas pleonasma, do ĝi povas doni al ili nenan senco-pluon. La konkreta senco de la o-finaĵaj substantivaj radikoj do estas, laŭ la sistemo, absoluta, rigida. Kaj la samon ni vidas en la lingvouzo: *martelo* neniokaze, eĉ ne helpe de la kunteksto, povas signi agen; *homo* neniokaze povas signi kvaliton.

La *adjektivaj* radikoj signas kvalitan karakterizon. La pleonasma a-finaĵo neniam povas al ili doni la sencon de aparteno aŭ rilato. La o-finaĵo plej nature donas al ili la sencan de abstraktaĵo, kaj vere tio estas la plej ofta okazo (la bono, la belo). Ofte ĝi signas ankaŭ la aktualan kvaliton (bono = boneco), sed la konkreta manifestiĝo (bonoj = bonaĵoj) jam estas malpli entenata en tiaj vortoj, do en tia senco ili estas malpli uzataj. Malpleje entenas la o-finaĵaj formoj la sencan de individua manifestiĝo (bono = bonulo), kaj efektive tiaj formoj estas uzataj nur tute escepte. La i-finaĵo povas al ili doni nur la sencan de stato, sed neniam la sencan de venigo en staton, ĉar tia senco ne povus esti konkludita el la elementoj; efektive: *puri* neniam estas uzata en la senco de *purigi*.

La *verbaj* radikoj signas agon, la verbaj finaĵoj apud ili estas pleonasmaj, do ne povas al ili doni senco-pluon. El tio sekvas, ke ili ne povas ŝanĝi la transitivecon aŭ

netransitivecon jam entenatan en la radiko. Efektive: *bruli* (el la netransitiva radiko *brul*) neniam signifas *bruligi*; *fini* (el la transitiva radiko *fin*) neniam signifas *finigi*. Male, la o-finaĵo kaj la a-finaĵo, kiuj ne estas pleonasmaj, permesas pli grandan elastecon: *skribo, nasko, murdo* ktp., povas signi same aktivan, kiel pasivan agon; kelkaj transitivityradikaj verboadjektivoj: *ĉagrena, fiksa, abstrakta, konfuza, korekta* estas uzataj same en aktiva kiel en pasiva senco. La o-finaĵaj formoj, kiel ni vidis, krome permesas tiun elastecon — pro la konkretiga senco de la o-finaĵo — ke ili povas signi ankaŭ la konkretan manifestiĝon, la rezulton de la ago (skribo = skribaĵo, desegno = desegnaĵo, baro = baraĵo). Sed la konkreta manifestiĝo estas la rezulto de la ago, ne ties instrumento! Tial do la o-finaĵo neniam povas doni al verbradiko la senco de ilo: *bato* neniam estas *batilo*, *komb* neniam estas *kombilo*.

El ĉio ĉi sekvas, ke la principo de Necesoj kaj Sufiĉoj, permesanta simple elĵeti ĉiujn elementojn nenecesajn, estas, sen la de-Saussure sistemo,

aŭ neefektivigebla, kiam temas pri konstruo de aparta vorto, sendepende da la kunteksto: sen la radikkarakteroj oni ja ne povas scii, kiajn elementojn entenas la radiko mem, kaj kiujn oni devas aparte signi;

aŭ erariga, se oni apogas sin sur la helpo de la kunteksto, ĉar tiam ĝi kondukas al uzo de formoj, kiuj laŭ la lingvouzo estas rekte nekorektaj (*komb* anst. *kombilo*, *sango* anst. *sangado*, *puri* anst. *purigi* ktp.).

Do, se oni volas gardi kaj legitimi tiun principon, tre necesan kaj fruktodonan, oni nepre devas ĝin kompletigi per la principo de la radikkarakteroj.

Indukta pravigo

Ĝis nun mi procedis tiel, ke mi simple skizis la sistemon, supozante la karakterojn fiksaĵojn de la radikoj, kaj mi provis, ke baze de tio oni ricevas formojn kun sencoj plene konformaj al la lingvouzo. Sed oni povas procedi ankaŭ inverse: esplori la lingvouzon, kaj sur ties bazo

pruvi, ke la radikoj devas havi fiksaĵn gramatikajn karakterojn.

Ni prenu parojn de verbaj vortoj kun pli malpli similaj sencoj:

reĝi-regi, agenti-kolporti, tajlori-kudri, profeti-aŭguri
marteli-bati, brosi-kombi, pioĉi-ŝoveli, ĉeni-ligi
beki-piki, genui-kaŭri, piedi-iri, oreli-aŭskulti
farbi-kolorigi, pendoli-balanciĝi, spici-garni, silabi-legi
Nun ni almetu al tiuj vortoj la o-finaĵon.

Se la radikoj estas nur vortostumpoj, al kiuj sole la finaĵoj donas signifon, estas evidente, ke la supraj simil-sencaj vortoj kun sama finaĵo devas havi sencojn similajn.

Sed — kion ni vidas?

reĝo, agento, tajloro, profeto signas personojn; rego, kolporto, kudro, aŭguro signas agojn;

martelo, broso, pioĉo, ĉeno signas ilojn; bato, kombo, ŝovelo, ligo signas agojn;

beko, genuo, piedo, orelo signas korpopartojn; piko, kaŭro, iro, aŭskulto signas agojn;

farbo, pendolo, spico, silabo signas objektojn; kolorigo, balanciĝo, garno, lego signas agojn.

Estas do okulfrapa diferenco! Kaj, ĉar la finaĵo, kiun ni aldonis, estis la sama, tiun diferencon ne povis kaŭzi la finaĵo: ĝi devas esti entenata jam en la radikoj mem!

Nun ni vidu, kion ni devas fari, se ni volas formi el la unua grupo substantivojn, kiuj signas agojn. Ni formu do tiajn:

reĝado, agentado, tajlorado, profetado

martelado, brozado, pioĉado, ĉenado

bekado, genuado, piedado, orelado

farbado, pendolado, spicado, silabado

Kion ni faris?

Ni signis la agan sencon aparte, per a d o .

Sed ni vidis, ke ĉe la alia grupo tio ne estis nepre necesa: ili jam en si mem signis agojn! Do tiu senco, kiun ili, kontraste al la unua grupo, enhavis, estis la senco aga!

Nun ni formu el la dua grupo vortojn, kiuj signas konkretaĵojn:

registro, kolportisto, kudristo, aŭguristo
batilo, kombilo, ŝovelilo, ligilo
pikilo, irilo, aŭskultilo
kolorigilo, garnaĵo, legaĵo
Kion ni faris?

Ni signis la konkretan sencon aparte, per isto, ilo
aŭ aĵo.

Sed ĉe la alia grupo tio estus superflua, eĉ erara! Ili
do jam en si mem enhavas tiun konkretan sencon.

Ĝis nun do ni trovis, ke en Esperanto oni devas
nepre, pro pure praktikaj konsideroj, distingi du grupojn
de radikoj:

tiujn, kiuj enhavas sencon de konkretaĵo, kaj kun
la o-finaĵo signas ties nomon;

tiujn, kiuj enhavas sencon de ago, kaj kun la o-finaĵo
signas la nomon de tiu ago.

*

Nun ni iru plue.

Ni vicigu a-finaĵajn vortojn kun pli malpli simila
senco:

granda-kolosa, stulta-azena, kruda-bruta, intima-hej-
ma, majesta-reĝa, kruela-barbara, nobla-nobela, severa-
tirana, afabla-amika.

Nun ni ŝanĝu la finaĵon je -o!

Se tiuj similsencaj po du vortoj havas tute la saman
radikan karakteron, evidente, kun la o-finaĵo ili devas
doni similsencajn vortojn, same kiel kun la a-finaĵo.

Sed ne tiel estas!

grando, stulto, krudo, intimo, majesto, kruelo, noblo,
severo, afablo signas kvalitojn aŭ abstraktaĵojn, sen ia
konkreta senco, do la kvalitan sencon ili konservis;

koloso, azeno, bruto, hejmo, reĝo, barbaro, nobelo,
triano, amiko signas konkretaĵojn (personojn aŭ objek-
tojn) — do la kvalitan sencon al tiuj radikoj donis sole
la a-finaĵo.

Nun ni formu nomojn de konkretaĵoj el la unua
grupo:

grandajo, stultulo, krudulo, intimejo, majestulo,
kruelulo, noblulo, severulo, afablulo

— do la konkretan sencon ĉi tie ni devis signi aparte. Kaj kiel abstraktigi la duan grupon? Jen: koloseco, azeneco, bruteco, hejmeco, reĝeco, barbar-eco, nobeleco, tiraneco, amikeco

— do la kvalitan, abstraktan sencon oni devis tie ĉi signi aparte per e c o .

RIM. Estas vere, ke kutime oni diras: grandeco, stulteco, krudeco ktp., sed, dum tio ne estas nepre necesa, kaj ne malofte, precipe en la poezio, oni trovas la suprajn mallongajn formojn, ĉe la alia grupo e c o *nemiam* estas ellasebla, kiam temas pri kvalito aŭ abstraktaĵo.

Inter tiuj du grupoj do ree estas esenca diferenco. kaj tiu diferenco devas esti entenata en la radiko men, ĉar ĝi evidentiĝas ĉe la sama o-finaĵo, do de ĉi tiu finaĵo ne povas esti donita!

*

Ĝis nun, mi kredas, tute klare mi pruvis, ke unu parto de la radikoj (*reĝ, martel, genu, hejm* kaj similaj) akre diferencas unuaparte de la radikoj, kiuj post la al-kroĉo de la o-finaĵo signas agon aŭ staton (*bat, reĝ, ktp.*), aliparte de tiuj, kiuj post la al-kroĉo de la o-finaĵo signas kvalitojn aŭ abstraktaĵojn (*majest, bel, nobl, ktp.*).

Nun ni vidu, ĉu ĉi tiuj du lastaj grupoj havas inter si diferencon! Ĉu oni ne povus loki ilin en unu sama klaso, distingante sole radikojn konkretajn kaj abstraktajn?

Efektive, la limoj inter tiuj du grupoj ne ĉiam estas akraj: ofte malfacile estas diri, ĉu temas pri radiko kvalita aŭ aga. Ekz-e, la vortojn *utili, rapidi* ni sentas radikaj verboj, tiel forta estas en ili la senco de la ago; dum la vortoj *utila, rapida* ŝajnas radike adjektivaj. Sed tio koncernas nur malmultajn vortojn. Ĉe tiaj vortoj la klasado ŝajnas indifera: *utilo, rapido* estas same devenigeb-laj el radikoj kvalitaj aŭ el agaj, certe estas nur, ke ili ne apartenas al la radikoj konkretaj. Se oni sentas ties neceson, oni povas distingi per e c o aŭ a d o : *utileco-utilado, rapideco-rapidado*.

Ni provu ankaŭ ĉi tie la supran metodon. Ni parigu

similsencajn vortojn, kaj ni esploru, ĉu tiuj kondutas simile aŭ diversmaniere:

Jen ekzemple *labori kaj diligenti*: vortoj similsencaj. Ni formu el ili adjektivojn: *labora kaj diligenta*. Nun ni uzu ilin: *labora komitato*: komitato, kiu laboras; *diligenta komitato*: komitato, kiu diligentas. — Sed: *labora inspektoro*: inspektoro pri laboro; *diligenta inspektoro*: inspektoro diligenta (neniam: inspektoro pri diligento!).

Same: *ama koro, afabla koro* — ambaŭ adjektivoj signas *kvaliton* de koro. Sed *ama letero* jam estas letero pri amo, dum *afabla letero* neniam estas letero pri afablo. *Nutra komitato* estas komitato pri nutro, dum *sata komitato* neniam estas komitato pri sato. *Viva kaj vigla* estas preskaŭ samsignifaj en *viva diskuto kaj vigla diskuto*, sed dum *viva problemo* estas problemo pri vivo, *vigla problemo* neniam estas problemo pri viglo.*)

Do — dum tiu parto de la abstraktaj radikoj, kiuj kun la o-finaĵo signas agon aŭ staton, povas kun la a-finaĵo signi jen *kvaliton*, jen *rilaton*, la *kvalitsencaj* signas kun la a-finaĵo ĉiam, senescepte, nur *kvaliton*!

Tio estas sufiĉa motivo distingi inter tiuj du grupoj.

Sekve, oni povas trankvile eldiri, ke la Esperantaj radikoj ne estas nur senkaraktaj stumpoj, ili havas jam en si mem klare kaj precize difinitan sencon kaj karakteron, kiuj decide influas ilian konduton ĉe la finaĵa pluformado.

La nomado de tiuj tri grupoj estas propre malgrava demando. Oni povus nomi tiujn tri klasojn: konkretaj radikoj, kvalitaj radikoj, agaj aŭ stataj radikoj. Sed plej oportuna ŝajnas konservi la malnovan terminaron: *substantivaj, adjektivaj, verbaj*. Ni vidis ja, ke la kvalitaj radikoj havas en si tian elementon, kian la konkretaj ricevas nur per la adjektiva a-finaĵo, kaj la verbaj radikoj entenas elementon, kian al la konkretaj pruntas sole la finaĵo verba. La radikojn do oni povas signi per tiu

*) Ĉi tiu esploro montras, ke *util* kaj *rapid* estas adjektivaj, ĉar *utilu konsilo* ne estas *konsilo pri utilo*, nek *rapida mezurilo* estas *mezurilo de rapido*.

parenteza finaĵo: *hom(o)*, *bel(a)*, *kur(i)*, sekve per substantiveco, adjektiveco aŭ verbeco.**)

La praktika valoro de la radikkarakteroj

Denove de alia flanko ni ataku la demandon, ne timante de ripetado! Ni vidu, kian utilon havas la studanto el la markado de la gramatikaj karakteroj en la vortaro.

1) Se li trovos apud iu vorto la signon de substantiveco, li scios, ke

a) kun la o-finaĵo li ricevos la sencon donitan per la difino;

b) kun la a-finaĵo li ricevos adjektivon, kiu signas aŭ kvaliton aŭ rilaton-apartenon;

c) kun la i-finaĵo li ricevos verbon, kies sencon donas la radiko (*per...* aŭ *kiel...*).

Krome li scios, ke la nomon de ago li devas esprimi

***) Noto.* Por la substantivaj radikoj, Stojan proponas pli detalan klasifikon: laŭ li oni devas distingi ilin laŭ sencoj *individuj* (homo, reĝo, tajloro), *instrumentaj* (martelo, pioĉo, broso), *loĉaj* (domo, hejmo, templo), *materialaj* (oro, metalo, ŝtono) ktp., ktp. Sed tiuj diferencoj estas *sencaj* kaj ne gramatikaj. El gramatika vidpunkto gravas nur la konduto de la radikoj ĉe la pluformado. Kaj, ĉar la radikoj apartenantaj al la supraĵ kategorioj unuece formas la nomon de ago per *ado* (reĝado, martelado, orado) kaj la nomon de kvalito per *eco* (reĝeco, hejmeco, metaleco), kaj per la sola o-finaĵo neniam povas signi la nomon de ago (kiel la radikoj verbaj), nek la nomon de abstrakta kvalito (kiel la radikoj adjektivaj), oni povas ilin, pure gramatike, klasi en unu solan grupon.

La samo rilatas ankaŭ al la radikoj agaj kaj stataj: el pure vortfara vidpunkto ili apartenas al unu sama grupo, ĉar kun la o-finaĵo ili signas agon aŭ staton, kun *ado* daŭron aŭ ripeton. Kompreneble ili diferencas ankaŭ laŭ transitiveco aŭ netransitiveco, sed tio ne rilatas strikte al la finaĵo aŭ parelementa pluformado.

per a d o , kaj la nomon de abstrakto aŭ kvalito per e c o .

2) Per la signo de adjektiveco li scios, ke

a) kun la a-finaĵo li ricevos la sencon donitan de la difino, sed nur sencon kvalitan, neniam rilatan-apartenan;

b) kun la o-finaĵo li ricevos unuavice la nomon de abstraktaĵo; duavice la nomon de kvalito (sed prefere kun e c o); triavice la nomon de konkretaĵo (sed prefere kun a ĵ o); kvaravice (evitinde!) la nomon de persono (preskaŭ ĉiam kun u l o).

c) kun la i-finaĵo li ricevos la sencon: *esti -a*, aŭ *stati, agi, impresi -e*.

3) Per la signo de verbeco li scios, ke

a) kun la i-finaĵo li ricevos la sencon donitan de la difino, severe, neŝanĝeble laŭ transitiveco aŭ netransitiveco;

b) kun la o-finaĵo li ricevos unuavice la nomon de la ago (pasive aŭ aktive). Ĉe kelkaj verboj tamen tiu o-finaĵa formo signas plie abstraktan koncepton ol aktualan agon; ĉe ili ĉi lastan oni neprigas per a d o . Duavice, li povas tiel ricevi la konkretan manifestiĝon, la rezulton de la ago (prefere kun a ĵ o).

c) kun la a-finaĵo li ricevos aŭ la sencon, ke la ago estas apartenaĵo, kvazaŭ kvalito de io (ama koro), aŭ la sencon, ke tiu ago rilatas al io (ama letero). Teorie ankaŭ en la a-finaĵa formo estas entenataj same la aktiva kiel la pasiva senco, sed pro praktikaj konsideroj, por eviti malklarecon, ĉi tie tio estas malpli utiligata kaj aplikiga nur malofte (ĉagrena koro).

Krome li scios, ke la agantan personon li devas esprimi ĉiam per isto aŭ ulo, kaj la instrumenton ĉiam per ilo.

Jen, oni klare vidas, ke la karaktersistoj donas praktikan orientadon, kio pruvas, ke ili ne estas superflujaj, des malpli malveraj! Tio, ke oni devas procedi diversmaniere laŭ la signoj, evidente pruvas, ke ili signas ekzistantajn gravajn karakterdiferencojn! Ĉiu esperantisto, senkonscie, procedas laŭ la supraj reguloj, do senkonscie, instinkte sentas la radik-karakterojn.

La kontraŭdiroj

Kiel estas eble, ke oni tamen rifuzis kaj provis refuti tiun ĉi sistemon?

Ni okupiĝu pri la kontraŭargumentoj.

1) La unua kontraŭdiro baziĝas sur simpla miskompreno. Ĝi argumentas per tio, ke el ĉia radiko oni povas formi ĉiajn vortojn: *tajloro, tajlori, tajlora, tajlore*. Sed — la sistemo tion ne kontraŭas; male, ĝi baziĝas ĝuste sur tio ĉi.

2) La dua kontraŭdiro baziĝas sur la formoj *beleco, legado* ktp., do sur tio, ke oni signas per *eco* kvaliton ĉe adjektivaj, kaj per *ado* agon ĉe verbaj radikoj. Sed tio ne refutas la sistemon: la mallongaj formoj (*belo, lego*) ja ekzistas, kaj aŭdante ilin, oni certe ne pensas pri konkretajoj, aŭ ili povas havi tian sencon nur helpe de la kunteksto, do oni konscias, ke ili en si mem estas nekompletaj formoj en tia senco. Cetere tiuj mallongaj formoj, do la ellaso de *eco* kaj *ado*, videble plioftiĝas en la lingvo.

3) Oni timas de komplikeco. Sed tio ne estas akceptebla motivo: la demando estas nur, ĉu la sistemo estas ĝusta aŭ ne. Cetere, ĉi tie ne temas pri *elektio* de sistemo nova, sed pri la *konstato* de la principoj, laŭ kiuj oni faras la vortojn en Esperanto. Do, se la sistemo estas komplika, oni povus helpi pri tio nur per la ŝanĝo de la Esperanta lingvouzo. Oni do povas diri, ke la kontraŭuloj aŭ ne estas sinceraj, aŭ volas reformojn!

4) Kontraŭdiri ŝajnas la sistemon, ke kelkfoje la radika karaktero ŝajne ŝanĝiĝas en kunmetitaj vortoj. Ekz-e en *senforta, senpova* la adjektiva aŭ verba radikoj (*fort, pov*) ŝajnas havi substantivan sencon (*forto, povo*). Sed, kiel mi montris aliloke, ĉi tie ne temas pri ŝanĝo de radikkaraktero, sed simple pri tio, ke la prepozicio *sen*, kiu povas rilati nur al substantivo, atribuas kaŝe, latente la *o*-finajon al la nesubstantivaj radikoj: la strukturo de tiuj vortoj do estas *sen-forto-a, sen-povo-a*, kaj tiuj *o*-finajoj (nevideblaj) estas tie estigitaj *logike* de *sen*. La fina *a*-finajo apartenas ne al *fort* aŭ *pov*, sed al la tutaj kompleksoj *sen-forto, sen-povo*. Tiuj

latentaj, kaŝitaj finaĵoj estas unu el la plej interesaj kaj utilaj proprecaĵoj de la Esperanta vortfarado, donante al ĝi ekstreman flekseblecon.

5) Oni mencias, ke de Saussure, la konstatinto de ĉi tiu sistemo, forlasis Esperanton. Sed estas tute konfuzo, identigi personon kun ties ideoj, kaj forĵeti la lastajn, ĉar al iu ne plaĉas aliaj agoj de tiu persono. Mi legis eĉ tion, ke la sistemo forkondukis de Esperanto de Saussure-on. Tio estas plene erara. Li serĉas en siaj novaj projektoj solvon de aliaj demandoj: forigo de supersignoj, de -ojn, -ajn, sistemigo de la Tabelo kaj de la prepozicioj ktp. La vortfaran sistemon li ne bezonis enhejmigi ekster Esperanto, kie ĝi estas hejme, ĉar Esperanto ne ekzistus, aŭ estus tute alia sen ĝi.

Cetere, de Saussure faris nur la klarajn formulojn de la vortfarado baze de la radikkarakteroj. La radikkarakterojn mem ne li malkovris unua; ilin konstatis *Boirac* jam antaŭ li.

6) Fine, oni diras la sistemon kontraŭ-Zamenhofa.

Nu, post kiam mi pruvis, ke tiu sistemo estas simple la sistemo de Esperanto, tio devus signifi, ke Esperanto mem estas kontraŭ-Zamenhofa.

Sed tio, kompreneble ne estas vera. Ĝi estas la sistemo de Zamenhof!

Kaj Zamenhof esprimis tion malkaŝe:

a) Li skribis al de Saussure pri ties franclingve aperinta vortfara lingvo (Orig. Verkaro pĝ. 445.):

»La verkon . . . mi trovas bonega. Laŭ mia opinio estus tre utile, se vi eldonus ĝin ankaŭ en Esperanto. por ke ĉiu esperantisto, precipe la verkantoj, atente ĝin tralegu kaj por ke ili penu observi tiujn principojn, kiujn vi bonege esploris kaj klarigis. Mi ne dubas, ke nia Akademio tre volonte donos al via propono sian oficialan aprobon . . .«.

Atentu! Zamenhof skribas, ne ke de Saussure faris bonegan sistemon, sed ke li bonege esploris kaj klarigis principojn! Esplori kaj klarigi oni povas nur ion ekzistantan: do la principoj, kiujn pritraktis de Saussure.

ekzistas en Esperanto laŭ Zamenhof mem, eĉ evidente estas liaj propraj principoj. Post tio estas kompreneble, ke Zamenhof ne dubis pri la Akademia aprobo.

Sed la Akademio, same kiel la nunaj kontraŭuloj, ŝajne kredis sin pli kompetentaj en tio ol Zamenhof mem.

La fakto estas, ke Zamenhof laboris laŭ principoj, sed li ne formulis ilin, ĉar en sia pure praktika laborado li laŭeble evitis teoriajn konsiderojn. Sed kiam li legis la verkon de de Saussure, li ĝoje rekonis en la klara kaj facila sistemo siajn instinkte sentatajn kaj aplikitajn principojn.

b) En sia letero al Th. Cart, Zamenhof skribas (Orig. Verkaro pg. 539.):

»Por *stuki*, kiel por *stampi*, mi volis doni al la radiko signifon verban.«

Atentu! Li ne skribas: »al la radiko *tradukón* verban«, nek: »al la *traduko* signifon verban«, sed la verban signifon li evidente atribuas al la *radiko* mem. Do, radiko povas havi en si mem verban signifon, t. e. verban karakteron!

Post la du supraj citaĵoj, ĉia parolo pri Zamenhofa Esperanto estas malplena parolo flanke de la kontraŭuloj de la sistemo! Se ili vere serioze konsideras sian Zamenhofecon, ili devas kapitulaci!

Vortaro sen radikkarakteroj

Nun ni supozu, ke ĉio, kion ni diris ĝis nun, estas erara. Ni supozu, ke radikkarakteroj ne ekzistas, ke la Akademio do devas eldoni tiun vortaron sen ilia markado.

Kiel ĝi faru do tion?

Nu, se ni atente esploras ĉi tiun demandon, ni devas konstati, ke la markado mem, per apartaj signoj, propre estas tute flanka afero. La karakteroj ja estas signitaj ankaŭ sen tio: simple per la difino. Se ekzemple oni difinas la radikon *abat* per *monaĥejstro*, la radikon *bel* per *plaĉanta al vido, aŭdo, spirito*, la radikon *kuŝ* per *esti en horizontala kaj ripoza pozicio*, — oni ja difinis ilin per substantivo, adjektivo, kaj verbo, do jam per tio mem

oni atribuis al ili substantivan, adjektivan aŭ verban signifon.

Do, se la kontraŭuloj estas konsekvencaj, ili devas protesti ne nur kontraŭ la aparta karaktersignado, sed ankaŭ kontraŭ tiu signado kaŝa, kiun enhavas la difinoj.

Efektive, ili argumentas per tio, ke en la Universala Vortaro la substantiveco, adjektiveco aŭ verbeco de la nacilingvaj difinoj devenas nur el la naturo de la naciaj lingvoj, kiuj, laŭ Nylén, »ne havas aliajn rimedojn por traduki la Esperantajn radikojn ol per naciaj vortoj; ili ja ne posedas respondajn radikojn.«

Laŭ ili do Esperanto posedas tiujn rimedojn! Sekve, en vortaro Esperanto-Esperanta devas esti uzataj tiuj rimedoj kaj oni povas kaj devas eviti tiun kaŝan markadon de la radikkarakteroj!

Ni esploru do la demandon el ĉi tiu vidpunkto! Ni serĉu tiujn rimedojn:

1) La unua rimedo povus esti eble, ke ankaŭ la difinoj okazu per radikoj. Do, ekzemple la difino de *tajlor* estu *vestfarist*. Sed — kion signifas *ist*? *Iu*, profesie okupiganta pri io! Nu, *iu* estas pronomo, anstataŭanta substantivon! Do, la difino ankaŭ tiamaniere atribuas substantivecon al *tajlor*. La karakter-signado do ankaŭ tiamaniere restis konservita; ĝi nur iĝis pli kaŝita.

Krome, se ekz-e la radikon *bagatel* oni difinas *negrava afer*, la adjektivo *negrava*, povanta rilati nur al substantivo, tuj denuncas la radikon *bagatel* kiel substantivan. Se *babil* estas *intime interparol*, la adverbo *intime* tuj denuncas la radikon *babil* kiel verban.

Eble oni povus kunmeti la difinon el nuraj radikoj. Ekz-e, *plumb*: *gri*: *mol pez metal*. Sed ankaŭ tio ne estus helpo! Ĉar aŭ la leganto devus rekoni tie ĉi la adjektivecon de *griz*, *mol*, *pez*, do per tio la substantivecon de *metal* kaj *plumb*, aŭ — li tute ne komprenus la difinon.

2) La dua rimedo estus, almeti al ĉiuj radikoj la o-finaĵon, kaj difini ilin tiamaniere: per tio forviŝiĝus la gramatika diferenco de la traduk-vortoj kun sia danĝera denuncemo. Jes, sed kio okazus? Parto de la difinoj komenciĝus per: *ago*, *kiu* . . . , alia parto per:

kvalito, kiu . . . do la aĝeto (verbeco) aŭ kvaliteco (adjektiveco) de la radikoj estus markita eĉ pli evidente.

3) La tria eblo estus: difini ne radikojn (hom, bel, kur), sed vortojn (homo, bela, kuri) do ĉiam aldoni la respektivan finaĵon. Sed, tiam la malbenita logikulo ree povus demandi: kial oni uzas finaĵojn diversajn! Tiuj radikoj ja tamen devas diferenci, se ili postulas malsamajn finaĵojn!

4) Fine la kvara eblo, kaj la lasta imag-ebla, estus difini la radikojn tute ĝenerale, kiel „simbolon de komuna ideo« (Panel). Sed tio estus tre malfacila tasko. Kiel oni difinu ekzemple la radikon *bat* tiamaniere, ke el la difino manku ĉia aludo al ago? Nu, eble tion tamen povus fari lingvistika genio. Sed per tio ni ricevus nur interesan lingvofilozofian klasadon de ideosimboloj, sen ia praktika valoro. Se ekzemple el *tajlor* oni forigus ĉian aludon al persono (do al radika substantiveco), oni devus fabrikii ion tian: radiko entenanta la ideon pri vestfarado. Sed — la saman difinon devus havi ankaŭ *kudr*. Kaj la esperantisto, kiu dankus sian scion al tia vortaro, eble dirus: Tiu kudro laboras tre malbone, li tute fuŝis la tajloron de mia vesto.

Jen, en la supraj kvar punktoj ni pruvis, ke tute ne estas eble difini la Esperantajn radikojn sen la markado de la radikkarakteroj. Ĉar estas ja tute egale, ĉu tiu markado okazas senkaŝe per signoj, aŭ kaŝe per la gramatika karaktero de la difinvortoj — la fakto estas la sama: la karakteroj ne povas esti nemarkitaj; same ne ĉe Esperantaj, kiel ĉe nacilingvaj difinoj.

Do kiam la kontraŭuloj batalas kontraŭ tiuj kompatindaj signoj, ili batalas kontraŭ literoj. La esencon ili ne tuŝas. La demando estas nun, ĉu tiu plumbatalo valoras la inkon.

Konkludo

Resumante la ĉi-suprajn pritraktojn, oni povas nerefuteble eldiri, ke

1) La vortfara sistemo de de Saussure rezultigas vortformojn kaj vortsencojn, kiuj plene konformas al

la lingvo-uzo en ĉiuj ties detaloj kaj havas la saman elastecon, kiel la lingvouzo;

2) inverse, la esploro de la lingvouzo kondukas rekte al la sistemo de de Saussure, baziĝanta sur la fiksitaj radik-karakteroj; tiu sistemo estas la sola valida sistemo aplikebla al nia lingvo;

3) tiu sistemo havas ne nur teorion, sed ankaŭ praktikan valoron;

4) ĉiuj teoriaj argumentoj kontraŭ tiu sistemo baziĝas sur miskomprenoj;

5) la sistemo estas Zamenhofa;

6) tute ne estas eble kunmeti radikaron sen la markado de la radikkarakteroj: se la markadon oni ne faras per apartaj signoj, ĝi ekzistas kaŝe ankaŭ sen tio en la difinoj.

La Akademio do povas havi solan taskon: doni al tiu sistemo, kiu plene praviĝis dum 27 jaroj, sian oficialan aprobon.

POPULAR ESPERANTO BOOKS

The Esperanto Book Service, official book service of EANA, is fully equipped to supply ALL your book needs. Here are a few titles. Write to the address below for complete book lists. Place all your orders with the "Esperanto Book Service."

ESPERANTO FOR BEGINNERS, <i>Butler</i> , easiest concise text, 28 p.....	\$.15
THE ESPERANTO TEACHER, <i>Stuttard</i> , an excel low-cost textbook, 106 p.....	.50
POPULARA LERNOLIBRO, <i>Kokeny</i> , LEARNER'S AID, <i>Dodge</i> , excel set 2 bks: Best easy graded <i>Reader</i> ; and <i>English Key & Guide</i> to Grammar, 106 p. SET	.70
ESSENTIAL ESPERANTO, <i>Gething</i> , good new standard textbook, 128 p..Cloth	2.50
STEP BY STEP IN ESPERANTO, <i>Butler</i> , easy "non-gram. method", 280 p. Cloth	1.85
ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE, <i>Connor-Solzbacher-Kao</i> , best, "6-bks-in-1", history, textbook, reader, directory, 2 dict. 245 p.....Cloth	3.50
NIXON ESPERANTO VOCABULARY, Eng-Esp & Esp-Eng, beginner dict. 178 p.	.75
EDINBURGH DICTIONARY, Esp-Eng & Eng-Esp, best handy dict. 300 p..Cloth	1.50
MILLIDGE DICTIONARY, Esperanto-English, best BIG Esp-Eng, 509 p..Cloth	2.50
FULCHER & LONG DICT, English-Esperanto, best BIG Eng-Esp, 352 p..Cloth	3.35
PLENA VORTARO DE ESP, all-Esp, with 'Suplemento', complete, 584 p..Cloth	4.35
TALKING YOUR WAY AROUND THE WORLD, <i>Prof. Pei</i> , account in Eng, 224 p.	.50
ONE LANGUAGE FOR THE WORLD, <i>Prof. Pei</i> , "how to achieve it", 307 p..Cloth	5.00
WORLD'S CHIEF LANGUAGES, <i>Prof. Pei</i> , all langs, incl. Esp. 663 p.....Cloth	6.75
SAY IT IN ESPERANTO, <i>Connor</i> , Eng & Esp, 1000 modern Esp phrases, 160 p.	.75
NAŬLINGVA ETIMOLOGIA LEKSIKONO, <i>Bastien</i> , Esp & 8 langs, 334 p..Cloth	2.35
FUNDAMENTA KRESTOMATIO, <i>Zamenhof</i> , basic Esp vol, 442 p....Deluxe BD	3.50
LINGVO KAJ VIVO, <i>Waringhien</i> , "Esperantologiaj Eseoj", must, 452 p.....Cloth	4.80
PLANLINGVAJ PROBLEMOJ, <i>Gilbert</i> , compares Esp. with "projects", 100 p..	1.25
ORA LIBRO DE ESP. MOVADO, richly illust. bk of 1st 50 yrs of Esp, 240 p....	1.75
ESPERANTISMO, <i>Braga</i> , Esp miscellany, topics in best Esp style, 32 p.....	.25
VIVO DE ZAMENHOF, <i>Privat</i> , remarkable story of his life, illust, 133 p...Cloth	1.15
LA SANKTA BIBLIO, "The best reader", bound in art vellum, 996 p.....Cloth	2.50
ESPERO INTERNACIA, 240 religious songs, full music notes, 230 p..Card BD	.75
KARLO, <i>Privat</i> , very popular easy first reader, life of young man, 47 p.....	.30
ESPERANTO-SORTIMENTO, good reading at low cost, 5 books, reg. 30¢ each: Akrobato, <i>Blanche</i> , <i>Argenta Akvo</i> , <i>Miserere</i> , <i>Thais</i> , <i>Rozujo</i> , over 200 p.....	1.00
TRI HOMOJ EN BOATO, <i>Jerome</i> , popular, easy, amusing, big novel, 258 p.....	1.50
PROVERBARO ESPERANTA, <i>Zamenhof</i> , with a full analytical index, 167 p....	1.70
MARIA KAJ LA GRUPO, <i>Emba</i> , excel orig novel re Marie & Esp Club, 172 p... .85	
MUZIK-NOTOJ, <i>Bagby & Kalocsay</i> , 10 songs, words & music complete, 34 p... .35	
ROMAJ ELEGIOJ & LA TAGLIBRO, <i>Goethe</i> (<i>Kalocsay</i>), amatory poems, 80 p.. .65	
SVISA ANTOLOGIO, <i>ed. Bauer</i> , from 4 langs, top best anthology, BIG 540 p... 3.95	
AMO EN LA JARO DEKMIL, <i>Elola</i> , novel, love's hidden power, 351 p....Bound 1.25	
ANSTATAŬA EDZINO, <i>Maxwell</i> , novel, love intrigue & escape, 212 p....Bound 1.15	
ALASKA STAFETO (& <i>Kaptitaj de la Glacirokoj</i>), <i>Omelka</i> , excel, 96 p....Cloth 1.15	
GÖSTA BERLING, <i>Lagerlöf</i> , exciting famed Swedish classic, 552 p.....Cloth 3.50	
LA MARVIRINETO, <i>Andersen's</i> fairy tale, deluxe illust LARGE, 78 big p.Cloth 2.40	
LA VERDA RAKETO, <i>Forge</i> , 9 orig novels, some re Esperanto, 150 p.....Cloth 2.40	
PORINFANA SERIO, 10 most beautiful illust. children's books, each 16 p..... 2.50	
SET OF 20 RARE KEYS, unique large rare set of 20 different languages..... 3.00	
YEARLY COLLECTIONS "AMERIKA ESPERANTISTO", complete, beginning 1944 to and including 1961 (except '48 and '59). Choose any 1 year, \$1.50; 3 or more years, ea. \$1.00; ALL 16 years complete since publication began, ea. 75¢ (only \$1.12 for ALL). Magazines shipped fr. EANA office, Portland.... 12.00	
ENAMEL GREEN STAR, Esperanto insignia - button, brooch or tie pin, each.. .50	
INDIAN BEAD STAR, truly a real 'jewel', orig \$1, 1 1/4" dia, safety catch..... .85	
ESPERANTO PENNANT, quality felt with Star & "Esperanto", 9" long 4" base .30	

**Esperanto Book Service, Williamsburg P.O. Box 315,
Brooklyn, New York 11211**

"SAY IT IN ESPERANTO"

by G. Alan and Doris T. Connor

Tells You What to Say and How to Say it!

You'll be delighted by the ease with which you'll immediately be saying whole phrases in Esperanto. Practice ordering meals, renting rooms, driving a car, going to a doctor, going shopping, etc., by using this handy manual.

5¼ x 3½ in. for purse or pocket. Over 1000 phrases, many never before translated into Esperanto. A complete index with unique numbering system so that you find the phrase you want instantly. A quality product with strong covers and sewn back. A guide to conversation, with summary of grammar. Useful in Esperanto courses.

It is a thoughtful, useful gift for friends, too!

Those who receive it will find much interest in learning to say useful phrases in Esperanto; and will want to go on to a mastery of the interlanguage. Order them in quantity!

Price only 75¢ each, discounts to groups & dealers.

Published by Dover Publications, Inc. Order from EANA.



only
75¢

LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through the *Esperanto Ass'n of N.A.* for benefits to both yourself and your Esperanto Central Office. You may select:

Esperanto	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	Latin	German	Afrikaans
Malay	French	Czech	Hindustani
English	Portuguese	Norwegian	Effik

Regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$57.50. Most other languages are priced the same. A few higher, a few lower—dependent upon number of records and other factors. Write to *Esperanto Ass'n of N.A.* about any language in which you are interested. Special payments for members of EANA.

Esperanto Ass'n of N.A., 1837 N.E. 49 Ave., Portland 13, Ore.